Svaz **jednotlivců** *„Ligo de Bohemaj Esperantistoj“*, který čítal loňského roku 52 členy, poskytuje českým Esperantistům, sídlícím v místech kde spolku není, výhod, které jim nahražují nemožnost súčastniti se esp. konversace. Členům jest za roční príspěvek **4 K** zasílán „Časopis Českých Esperantistů, dostávají zdarma odznak, mají slevy na našich publikacích a mohou si vypůjčovati (za hražení poštovného) knihy z knihovny, která jest jim redakcí tohoto časopisu dávána k disposici. (Dnes obsahuje 150 nejnovějších děl esperantských a stále se doplňuje). — Jak jest vidno, sleduje tento svaz pouze jediný cíl: státi se platným činitelem českých přátel Esperanta, jimž poskytuje výhod více, než jest mu příspěvků odváděno. Adresa: Esperanto-oficejo, Praha II. Vodičkova ulice 38.

Do knihovny svazu jednotlivců Ligo de Bohemaj Esperantistoj byly zařazeny knihy (č. 1—144. viz. v předcházejících ročnících tohoto časopisu):

K č. 74. *d)* Int. Librotrezoro n-o 7, 8: *Svisaj Rankotoj*, trad. el germ lingvo Ch. Pulvers (66 pĝ.).

e) Id. n-o 9: *La Pafo*. Novelo de Puškin; trad. Dr. A. Fišer (22. pĝ.).

č. 145 Int. Mondliteraturo n-o 7: Ad. Dygasinski: *Lupo, hundo kaj homoj*; el pola lingvo trad. Br. Kuhl (88 pĝ.).

č. 146. L. Hust Sondot: *En la lando de la Blanka Monto*; el la franca lingvo trad. Dr. Noël (67 pĝ.).

č. 147. „La Ondo de Esp.“: *Orienta Almanako*; trad. el aziaj lingvoj. (95 pĝ.).

č. 148. Styler: *En la montoj*; orig. (39 pĝ.).

č. 149. Gatty: *Alegorioj el la naturo*; el la angla lingvo trad. GaGo. (47 pĝ.).

č 150. *Travivaĵoj de Ro. Ŝo.* Originala. (93 pĝ.).

Adresa knihovny: Sinjorino Eliška Kočvarová, Rokycany 33. Knihy mohou si vypůjčovati členové za náhradu poštovních výloh. Žádáme, aby knihy byly vráceny po 14 dnech.

E. K. en Praha: Post finiĝo de la vintra kurso estis en kancelario de B. U. E. malfermitaj novaj: elementa marde 8-9 s-o K. Procházka, supera merkrede 8-9 Ed. Kühnl. Ĉiuvendrede kunvenas samloke la membroj por aŭskulti kaj pritrakti elektitan temon en Esperanto (ekz. dum la lasta tempo: Proverboj. Spertoj dum la lasta somero. Poemoj. Aviado. Signifo de la Kristnasko. Raportoj el la esp. gazetoj. La 27./III. okazis memorkunveno je honoro de J. A. Komenský). — La ĝen. kunveno (6./II.) elektis kiel prezidanton s-on Dr. V. Rosický; sekretario estas s-o Ing. Fr. Kühnl, kasisto s-o Fr. Novák. La biblioteko, pri kiu zorgas kun laŭdinda fervovo s-o J. Bohuslav, estis riĉigita per 100 novaj verkoj esper. La ĝ. kunveno unuanime aprobis la proponon rekomendi al B. U. E. aranĝon de slava kongreso esp. 1915 kaj rifuzi la oficialan partoprenon ĉe la IV. Tutaŭstria Tago.

En la kurso malfermita je fino de 1913. de la E. K. en **Praha VIII.** instruadis s-o Em. Batěk, emer. lernejestro el Říčany

kaj s-o Václav Procházka. La ĝen. kunveno elektis s-on Procházka prezidanto, s-on Jan Syřiště sekretario.

E. K. en **Žižkov** elektis en sia ĝen. kunv. la 20./II. s-on V. Novák prezidanto, s-on V. Brož vicprez., s-on Jar. Kopecký sekr., s-inon M. Dobešová kasistino.

Dum la pasinta somero vizitis la klubon en **Č. Budějovice** s-oj kand. med. H. Karpfen, prof. Otto Simon el Wien kaj s-o Spiegelhalter el Budapest. Post la libertempa sezono oni eklaboris denove la 24. de septembro. La 4. de okt. estis aranĝita amuza vespero kun lumbilda parolado pri Esperanto kaj abunda programo, kies sukceson oni dankas precipe al s-ino Ullmanová, f-inoj Mafhová kaj Štichová, s-oj Svačina, Hollegcha kaj al la kantista rondeto. Novan kurson (elementan) malfermis la 8. de okt. s-o ĉeflt. Hollegcha por 20 lernantoj; superan kurson por 13 klubanoj gvidas s-o faka instruisto Svačina. (Ambaŭ nomitaj s-oj estis elektitaj delegitoj por B. U. E.). Serio da kvin belegaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de la urbo kaj de kastelo Hluboká ĵus aperis. Prezo de unu serio 40 h. Vidu anoncon!

E. K. en **Nymburk**: La ĝen. kunv., kiun partoprenis 19 membroj, elektis kiel prezidanton s-on Alois Veselý, vicprez. s-on Jiří Klus, sekr. s-on Václ. Jadrný, kas. s-on Fr. Moravec. Nova kurso de s-o Jos. Šilhart malfermiĝis la 12./II.

La klubo en **Kutná Hora** aranĝis la 3./I. 1914 akademion, kies sukceson garantiis fervoreco de la membraro. Krom esperantaj kantoj kaj recitaĵoj estis ludata unuakta komedio de Jonáš: „Nova sporto", tradukita de f-ino Mrázková en Esperanton. Detala raporto pri tiu ĉi festo aperis en la loka gazeto „Podvysocké Listy", kies redakcio kompleze akceptas raportojn pri esperanta movado. — La 26./I. okazis ĝen. kunveno, kiu elektis prezidanto s-on Alois Horáček, fakan instruiston. — S-o Horáček esperantigis klarigan tekston por luksa publikaĵo pri Kutná Hora, eldonita de f-o Holan. (1 K, Sm. 0·600). Ĝi enhavas 18 tutpaĝajn bildojn, belaspekte presitajn. La verko bone reprezentas nian patrujon laŭ vidpunkto de sia valora enhavo kaj arta eksteraĵo. — En la lasta kurso instruadis 20 personojn s-o faka instr. A. Horáček,

E. K. en **Rakovník**: La ĝen. kunveno 18./I. elektis kiel prezidanton s-on Černý; s-on Pokorný kiel sekretarion, s-on Ringler kiel kasiston. — Estas projektata ekspozicio de diversaj objektoj karakterizantaj la fremdajn naciojn, de presaĵoj, bildoj, fotografaĵoj ktp. Vicprez. s-o Kučera gvidas konstantajn rubrikojn pri E. en Rakovnický kraj, Rakovnické Listy, Svět En Český Svět aperis lia traduko el Orienta Almanko. S-o Černý instruas en kurso. — La klubo malferms je fino de julio 1913 ekspozicion el la lernejo de Kněževes, kiu estis vizitata de gastoj el la tuta ĉirkaŭaĵo. Por la somera sezono estas projektata regiona kunveno kun ekskurso al kastelo Křivoklát



Wien: Bohema Klubo Esp. aranĝis la 5./X. 1913 grandnom-

bran viziton al tombo de la unua batalanto por nia ideo en Wien, s-o K. Macháček, mortinta antaŭ unu jaro. La sekretario parolis pri la meritoj de la mortinta prezidato kaj la partoprenantoj ornamis per floroj la tombon, sur kies monumento estas gravurita esperanta epitafo: „Nia kara prezidinto! Tie ĉi subtere putras nur la korpo morta, sed ĉe ni animo Via restas kara, forta. En dolor' senlima ni konsolon havas nune, ke ni nin revidos en la eterneco kune. Bohema Klubo Esperantista en Vieno". La monumento estis fotografita. — E. kursoj por Bohemoj: Kvartalo III. (instruas s-o Jaroš; kurso supera); kv. X. (s-o Klimeš); kv. XIV. (s-o Franc); kv. V. (s-o Kocourek); kv. XX. kurso por laboristoj (s-o Bačo); kurso de la klubo XV. (s-o Tachecí). — „Vídeňský Denník", ĉiutaga bohema jurnalo, alportas regule detalajn raportojn pri la esperanta movado (red. s-o Rud. Dostál). — En la ĝen. kunv. la 20./II. estis elektitaj: kiel prezidanto s-o Rud. Koutník, kiel sekr. s-o Rud. Dostál.

Silezia E. K. en **Radvanice**. La ĝen. kunv. okazis la 8./II. Estis elektitaj: s-o Fr. Dvorník prezidanto, s-o Fr. Stachura, sekretario.

(F i n o d e p a r t o o f i c i a l a).

En L o š t i c e (Moravio) parolis pri Esperanto la 28./XII. 1913 s-o prof. Rud. Fridrich antaŭ 200 personoj. La paroladon aranĝis s-oj B. Straka kaj B. Verner. Taŭgan ĉambron disponigis s-o Al. Chudoba, direktoro de la burĝa lernejo, kiu fariĝis nia fervora partiano. Samtage estis malfermita ekspozicio de esp. literaturo kaj de kartoj. La 8./II. malfermiĝis kurso por 30 lernantoj. —

M o r a v i a j E s p e r a n t o-P i o n i r o j eldonis glumarkojn kun interesa sentenco de J. A. Komenský (Comenius): „Forte staras nia deziro, ke oni elektu unu lingvon, per kiu ĉiuj nacioj komune parolu.... kiu estu pli facila ol ĉiuj lingvoj konataj, por ke oni povu ĝin ellerni sen perdo de la tempo kaj objektoj". Prezo por 100 ekz. 75 h (Sm. 0·350), 500 ekz. 3·— K (Sm. 1·400). Mendu ĉe s-o J. U. C. Jar. Mastný en Olomouc. La sama sendos al vi ilustr. gvidlibron pri Olomouc (40 h) kaj poŝtkartojn. Semajna rubriko pri E. aperas en „Proudy". — Kurso por 20 geinstruistoj estis malfermita de s-o instr. Neužil en Pöttingeum. — En la kafejo de „Národní dům" estas elmetataj esper. gazetoj. Baldaŭ aperos eldonita de M. E. P. adresaro de moraviaj samideanoj, kiu enhavos la jenajn datojn: adreson, daton de esperantistiĝo, gazetojn abonatajn, membrecon. Prezo 50 h. (*-ich*). — En Veselí n. M. instruas f-ino F. Řeháková, instr. — En H o d o l a n y malfermis kurson por laboristoj s-o Zapletal. En Olomouc instruas s-o A. Kudela el Novosady 15 lernantojn. — E. K. en P l z e ň, kies ĝen. kunv. okazis la 7./II., kunvenas marde en la rest. „U tří sokolů", sabate en kafejo „Sport". Kurso: s-o Tittl (32 lernantoj). Laborista Asocio E. aranĝis kurson por 20 personoj. — En S t r a k o n i c e estis refoje malfermita en la „Klubo de komizoj" kurso pri Esperanto daŭrinta de la 15/XI. ĝis la 15./III. 1914. Instruis s-o Fr. Fišer. — P a r d u b i c e: kursoj estis gvidataj de s-o Dr. St. Schulhof kaj s-ino Petrová. Kunvenoj en hotelo „U Střebských" (merkrede). — P ř e l o u č: kurso de s-o Vosáhlo. — B o h d a n e č: kurso de s-o instr. Hodač. — C h r u d i m: s-o Gallat, i. r. fin. konsilanto revivigis nian aferon en tiu ĉi urbo; kurso estis malfermita en gimnazio.

En „N á r o d n í P o l i t i k a" 31./X. 1913 aperis du favoraj felietonoj pri artefarita lingvo ĝenerale kaj speciale pri Esp., skribitaj de Olga Fastrová.

En „Mladoboleslavské Listy“ aperas rubriko pri E. redaktata de s-o V. Svoboda. Nova rubriko de B. U. E. estis enaĉfermieta de post la 9./II. 1914 en dimanĉaj numeroj de la jurnalo „Hlas Národa“ kaj „Kurýr“ en Praha.

Alvoko! „Esperantista Klubo en Rakovník“ (Bohemujo) intencas aranĝi en aŭtuno 1914 ekspozicion kaj petas tiukaŭze ĉiujn eldonistojn pri alsendo de eldonaĵoj esperantaj, komercistojn pri iliaj esp. prezaroj kaj specimenoj; ĉiu samideano sendu almenaŭ poŝtkartojn, poŝtmarkojn k. s. aŭ prunte aŭ donace. Reciproka korespondado proponata! — Sin turni al del. de U. E. A. s-o Hynek Černý, prezidanto.

Internacia dentista kongreso okazos en aŭgusto 1914 en Londono. Oni povas firme esperi, ke Esperanto estos en ĝi permesota kiel diskutlingvo same, kiel tio okazis jam ĉe la unua franca dentista kongreso en Parizo kaj ĉe la internacia en Berlino. Ĉar Esperanto faris de tiam gravajn paŝojn, estas jam tempo, ke samprofesianoj de ĉiuj nacioj, kiuj scias Esperanton aŭ interesiĝas pri ĝi, kuniĝu kaj ĉe la londona kongreso ĝin uzu en privataj kaj sciencaj aferoj. Kiu el la kolegoj konsentas kun tio, sendu sciigon (neligantan) al Dr. Haas en Bielitz (Aŭstrio, Silezio).

PROVERBOJ.

Proverbo estas konciza, komune valoranta, en buŝo de popolo vivanta juĝo pri iu afero. Laŭ sia formo ĝi aspektas aŭ kiel admono („Restu tajloro ĉe via laboro“), aŭ kiel konstato de okazintaĵo („Eĉ signo ne restis, kie urbo estis“), aŭ kiel formuligo de vero, valoranta por certaj okazoj („Troa festeno estas veneno“). Tiaj frazoj koncernas ĉiujn flankojn de popola vivo, ja oni povas en ili rimarki eĉ postsignojn el mitaj tempoj („Trafi de Scilo al Ĥaribdo“). Tial havas la proverboj grandan signifon por ekkono de la genta individueco kaj ili estis tre frue objekto de diligenta studado. Ilian tradician konserviĝadon tre helpas la sprita formo, kiu estas aŭ simple instrua („Laboro donas bonstaton, mallaboro malsaton“), aŭ alegoria kaj parabola („Muso la katon ĉiam ofendis“). Sed ĉiam estas postulata koncentriĝo de la penso sur unu konkreta kazo. Proverbojn havas ĉiu nacio; pri ilia ŝatateco ne decidas tiel popola deveno, kiel konveneco de la prijuĝo por la rilata kazo. Tiel ni vidas, ke multaj proverbokarakteraj frazoj transiradis de unu nacio al alia, multaj ĉe la kristanaj nacioj devenis el la biblio, en kiu ili ankaŭ ne estas elpensaĵo de unu viro, multaj enŝoviĝis en tradicion el antikvoklasikaj literaturoj (el Esopo, Katono kaj el aliaj kolektoj).

Ĉe esplorado de ilia deveno ne estas decida enhavo, sed alegorio, per kiu la instruo estas vualita („Gratis equo oblato noli pandere buccas“ — „Einem geschenkten Gaul schaut man nicht ins Maul“ — „Darovanému koni na zuby nehleď“ — „Al ĉevalo donacita buŝon ne esploru“).

La proverboj distingiĝas laŭ diversaj karakterizaĵoj. Ili estas: rimitaj aŭ senrimaj, naciaj kaj universalaj, ŝercaj aŭ seriozaj, empiriaj (de sperto naskitaj), logikaj, historiaj aŭ anekdotaj.

Ne estas konsilinde sin ĉiam direkti laŭ proverboj, ĉar ili povas enteni ankaŭ malveraĵon. Same estus ridinde en sia parolo

senĉese uzi la proverbojn, ĉar tiel oni atestus, ke oni ne scias pensi memstaro.

Frazoj de proverba karaktero aperas en bohema literaturo jam en la plej malnova tempo. En Alexandreis la triversaj sentencoj kaŝas ofte opinion de popola deveno; frazojn de instrua karaktero ŝatas uzadi verkinto de la tiel nomata Kroniko de Dalimil, same Stítný konservis al ni kelke da proverboj. La plej malnova efektiva kolekto da bohemaj proverboj kaj sentencoj (dirmanieroj) estas de Smil Flaška z Pardubic (ĝi enhavas 238 frazojn). Krom aliaj ankaŭ Jan Amos Komenský eldonis por bezono de la lernejo kolekton da proverboj sub titolo: „Saĝo de la antikvaj Bohemoj kiel spegulo starigita por la posteuloj“. En la j. 1852 eliris la glora verko: „Filozofio de la slava nacio en proverboj“ de Fr. Lad. Čelakovský. La moraviajn proverbojn kolektis Fr. Bartoš, la sileziajn la tiea etnografia komisio. Grandan kolekton da slovakaj proverboj faritan de Záturecký eldonis Bohema Akademio 1898.

En Esperanto ni havas belan kolekton: „Proverbaro Esperanta“, kiun aranĝis nia Majstro laŭ la verko: „Frazeologio rusa pola-franca-germana“ de sia patro M. F. Zamenhof. *K. P.*

BIBLIOGRAFIO.

Vere interesa estas la lukse eldonita **Albumo** de la kongresanoj, kiuj partoprenis nian VIII-an en **Kraków.** Sur kreta papero estas bone reproduktitaj krom bildoj de la festoj portretoj de 554 konataj amikoj, kiujn ni salutis dum la neforgesota semajno. La aldonitaj nomoj kaj adresoj faras el la libro utilan kaj fidindan adresaron.

„*Travivaĵoj de Ro. Ŝo*“ (Richard Sharpe) originale verkita libro en Esperanto, skribita, de malnova angla samideano, kiu post sia reveno el Sudameriko kaj aliaj landoj, ĉeestis la lastajn ses internaciajn kongresojn, kiel ankaŭ kelkajn naciajn kaj estas sufiĉe bone konata. Parto de la verko jam aperis en tri numeroj de „British Esperantist“ kaj la aŭtoro ricevis tre flatajn leterojn koncerne ĝin. La stilo estas vere „zamenhofa“ kaj tute imitinda. La aŭtoro scias tre bone prezenti al la leganto rakonton pri interesaj okazaĵoj en maniero lerta, sprita kaj samtempe instrua. La aŭtoro ne celas komercan akiron, sed fordonos sian tutan profiton al la esperantaj blinduloj, kaj pro tio sola li certe meritas koran apogon de la tutmonda Esperantistaro.

La 93 paĝoj estas bone presitaj, sur bonkvalita papero, entenas portreton de la aŭtoro kaj vidaĵon de Torquay, la plej bela marurbo en Anglujo. La prezo Sm. 0·750 (K 1·80) estas vere modera.

Ĵus aperis dua, originale en Esperanto verkita romano, titolita „*Mirinda Amo*“ el la lerta plumo de la aŭtoro de „Paŭlo Debenham“, S-ro. H A. Luyken. La tuja, granda sukceso, kiun havis lia unua esperanta romano, kuraĝigis s-on Luyken entrepreni la verkadon de nova originalaĵo. Nelonge post la apero de „Paŭlo Debenham“ la verkinto recevis multajn permespetojn rilate al traduko de la libro en fremdajn naciajn lingvojn, nome en la danan, germanan kaj italan. Kaj jam longe antaŭ la finiĝo de „Mirinda Amo“ kelkaj samideanoj eksterlandaj proponis traduki la libron. — „Paŭlo Debenham“ estas transskribita per reliefliteroj

por blinduloj (Braille'a sistemo) por grava nacia asocio angla, kaj la nova verko ankaŭ estos same eldonita, legebla por blinduloj.— La nova verko estas tre bele kaj lukse presita. Ĝi enhavas 259 paĝojn. La prezoj: broŝurita kun arta kovrilo el papero K 3·00 (Sm. 1.250), forte bindita en blua tolo K 4·25 (Sm. 1.750.)

Ch. Dickens: *La batalo de l' vivo*. El germana traduko tradukis Dr. L. L. Zamenhof. (88 pĝ. 15]×21). Prezo 1 Sh (K 1·20). Eld. Stead's Publ. Office, London.

En klariga antaŭparolo adresita al la legantoj skribas aŭtoro de Esperanto: „En la unuaj jaroj de ekzistado de Esperanto unu sinjoro montris al mi germanan libron (tradukon de verko de Dickens) kaj diris: ĉi tion oni certe ne povus traduki en Esperanton. Por konvinki tiun sinjoron, ke li eraras, mi prenis la libron kaj tradukis ĝin. Ĉar la verko ne sole ne estas tradukita el la originalo, sed mi eĉ ne komparis ĝin kun la originalo, tial mi dum longa tempo ne deziris reeldoni ĝin. Sed kelkaj amikoj trovis, ke por multaj esperantistoj eble estos interese legi libron, aperintan en la unuaj jaroj de Esperanto; tial mi cedis al ilia deziro kaj donis mian konsenton por reeldono de la verko."

La unuan fojon aperis la traduko en la unua esperanta monata gazeto „La Esperantisto", kiu estis eldonata en Nürenberg de dr. Zamenhof en la jaro 1891. Tiu ĉi gazeto ne estas nun havebla; nur tre malmulte da personoj ĝin legis, kaj multaj eĉ ne aŭdis pri ĝi. Estas certa, ke „La batalo de l' vivo" havos grandan intereson, unue por la Esperantistoj, kiuj deziras legi ĉian verkon el la plumo de la Majstro, due por tiuj, kiuj admiras la mondkonatan verkinton Dickens. Koncerne la lingvon ĉi tiu verko pruvas sen ia dubo, ke la lingva fundamento en la jaro 1891 estis la sama kiel la fundamento de la nuna jaro; la verko, skribita antaŭ 23 jaroj, faras impreson, kvazaŭ ĝi estus skribita nun, kaj tio estas la plej bona pruvo, ke nia lingvo estas tute konstanta kaj fortika, ke ĝi ne timas kaj neniam timos la influojn de la tempo aŭ de iaj neantaŭviditaj cirkonstancoj.

Gvidfolioj, eldonitaj jam por pli multe ol 100 eŭropaj urboj, celas liveri al la vojaĝanto la plej urĝajn informojn pri la urbo laŭ vidpunktoj ĝenerala kaj esperantista, enhavante utilajn adresojn de delegito de U. E. A., de la kluboj, hoteloj, informojn pri la plej vizitindaj vidindaĵoj, pri komunikiloj k. t. p. Prezo de 10 ekz. 10 hel., 25 ekz. 25 hel., 50 ekz. 50 hel.; plena kolekto (kun sep universitataj gvidfolioj) 75 hel. — **Gvidlibroj** konigas pli detale iun difinitan urbon aŭ regionon. Multaj lokoj eldonis jam ampleksajn broŝurojn kaj librojn ilustritajn, el kiuj estas kelkaj sendataj senpage (poŝtmarko 10—15 ctm). Kolekto da 18 gvidlibroj (por K 2·80) estas havebla (same kiel la gvidfolioj) ĉe „Universala Esperanto-Asocio" en Genève 10. rue de la Bourse.

(*Rim*. Gvidlibron tra Praha po 63 h. kaj Gvidfolion po 2 h. mendu ĉe redakcio de „Ĉ. Ĉ. E.").

Ĉe „Centra Oficejo Esp." Paris. 51. rue de Clichy:

Tutmonda Jarlibro Esperantista 1913—1914. Prezo K 3·50 (Sm 1·400). 248 pĝ. Enhavo: I. Almanako, kolekto da sciigoj, kiuj prezentas por la Esperantistaro intereson. Tutmonda statistiko: populacio, lingvoj. Historio de Esperanto. Parizo. Berno. II. Oficialaj institucioj. III. Internaciaj fakaj asocioj kaj korporacioj. IV. Regionaj propagandaj asocioj. V. Esp. gazetoj. VI. Korespondantoj. Kontuloj de la Ĉekbanko Esp. — Baldaŭ aperos aldono al tiu ĉi libro, enhavonta la korektojn ricevitajn antaŭ fino de marto.

Ĉe Ader & Borel, Dresden A. Struvestr. 41.

Esperantista poŝkalendaro 1914. Red. H. Böbs. 218 pĝ. Prezo K 1·00 (Sm 0·400). La verko enhavas interalie nomaron de esp. kluboj en Germanujo. Aŭstrio-Hungarujo kaj Svisujo. En intereso de la eldonaĵo estas rekomendinde fari ĝin pure esperanta, por ke ĝi havu pli multe da valoro ankaŭ por la negermanaj samideanoj. — Esperanta Biblioteko Internacia. N-o 25. H. Christaller: *Noveletoj el la Nigra Arbaro.* Trad. W. Christaller. 47 pĝ. N-o 26. A. de Vigny: *La intervidiĝo kaj Nekonita Dialogo.* Trad. Sam. Meyer. 39 pĝ. N-o 27. Enrst Zahn: *La Patrino.* Trad. J. Ŝmid. 55 pĝ. N-o 28. Ch. Pulvers: *Elzasaj Legendoj.* Orig. 47 pĝ. Prezo de ĉiu volumo 24 hal. (Sm 0·100). Vidu anoncon.

Ĉe Presa Esperantista Societo, Paris. 33. rue Lacépède:

Léon Huot-Sordot: *En la lando de la Blanka Monto.* Trad. Dr. Noël. 67 pĝ. Prezo 1 K (Sm 0·400). — N. V. Gogol: *Portreto.* Rakonto trad. de Dr. A. Fišer. 85 pĝ. Prezo K 1·25 (Sm 0·500). — *Esperanto: Nations Complémentaires* par Th. Cart et Em. Robert. 45 pĝ. Prezo K 0·40.

Ĉe Hachette & Cie. Paris. 79. Bd. St. Germain:

E. Grosjean-Maupin: *Dictionnaire Usuel Français-Esperanto.* 392 pĝ. Prezo K 3·50. — M. Wolf: *Patreco.* Kvarakta socia dramo. 56 pĝ. Prezo K 1·25 (Sm 0·500). — Ch. Dickens: *La Batalo de l'vivo.* Trad. Dr. L. L. Zamenhof. 88 pĝ. Prezo K 1·25 (Sm 0·500).

Ĉe British Esperanto-Ass. London W. C. 133-6. High Holborn:

Travivaĵoj de Ro. Ŝo. Originale verkita de Richard Sharpe. 93 pĝ. Prezo K 1·80 (Sm 0·750). — A. E. Styler: *En la montoj.* Orig. 39 pĝ. Prezo? — M. Gatty: *Alegorioj el la naturo.* Trad. Gego. 47 pĝ. Prezo K 0·60 (Sm 0·25). — H. A. Luyken: *Mirinda Amo.* Romano orig. verkita en Esperanto. 295 pĝ. Prezo K 3·00 (Sm 1·250) broŝ.

Ĉe Librejo „Esperanto", Moskva, Lubjanskij pr. 3.

G. Davidov: *Historio de esperantista movado en Saratov 1887—1912.* Trad. el la rusa lingvo Dr. N. A. Kabanov. 38 pĝ. Prezo K 0·70 (Sm 0·300). — A. A. Saĥarov: Superforta ambicio. Skizo el la esperantista vivo, orig. verkita. 52 pĝ. Prezo K 0·55 (Sm 0·22).

Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství, společnost s r. o. Praha.

KORESPONDANTOJ:

En tiu ĉi rubriko estas publikigataj senpage adresoj de alilandaj samideanoj, kiuj serĉas korespondantojn inter Bohemoj. Atentigu pri tio viajn amikojn!

(*Mallongigoj*: int. = interŝanĝas; il. k. = ilustritaj kartoj; p. m. = poŝtmarkoj; sgm. = sigelmarkoj). — *1. S-o Martin Hecht, ekspedisto, *Elterlein*, Saksujo (il. k.; p. m.) — *2. S-o. Oskar Ziegler, *Miesbach-Neumühle*, Bavarujo (por la ekspozicio kolektas esp. il. k.; interŝanĝe sendas il. k.). — *3. S-o Karl Schulze, *Sablon b. Metz*, Kirchstr 95. Germanujo, (il. k., interŝ. p. m.). — *4. S-o Preposto Becker, *Bromberg*. Alte Pfarrstr. 3. Germ. (int. esp. sgm.). — *5. S-o Hans Alles, *Düsseldorf*, Ronsdorferstr. 91./III. Rejnlando. (int. il. k. por la ekspozicio en D.; ĉiam resp.). — *6. S-o Friedrich Schwarz, *Offenbach a. Mainz*, Sprendlingerstr. 9. (il. k.). — *7. S-o Dr. A. Seeberger, *Regensburg*, Albertstr. 12. Bavarujo (kol. por la eksp. esp. gaz kaj sgm.). — *8. S-o Wilhelm Daum, studento, *Bonn*, Dorotheenstr. 50. (kor. kun fraŭlinoj kaj ŝakludantoj). — *9. S-o H Hoppe, korektisto. *Dresden*, Portikusstr. 12. (il. k., esp. sgm.). — *10. S-o Hermann Mayer, *Reinhausen ap. Regensburg*. (il. k.; kor. kun fraŭlinoj) — *11. S-o Philipp Weiss, reĝa fervojsekretario, *Marktbreit a. Main*. — *12. S-o Walter Dröge, *Braunschweig*, Kasernenstr 5. (int. leterojn, il. k., gazetojn esp.). — *13. H. Pfaffenberger. Inf. 9-12./III. *Fürth i. B.* (il. k). — *14. *15. Fraŭlino Martha Blechschmidt, *Gera*, 35. Schulstr. 35. Reuss. F-ino Erna Meyner, *Gera*, Markt. 4/III. (dez. kor. kun eksterеŭropaj Esp.). — *16. S-o Richard Brügemann, *Berlin S. W. 29.*, Fürbringerstr. 10. (il. k. koloritaj: ĉiam resp.). — *17. S-o Otto Türk, *Siegmar-Chemnitz*. Saksujo (il. k.). — *18. S-o Rud. Süss, *Chemnitz i. Sa.* Barbarossastr. 54./I. — *19. S-o Ernest Vogt, oficisto de la administrejo. *Krumbach i. Schw* Bavarujo (int. p. m. en leteroj po almenaŭ 120 ekz. vendos po 2 K afr. oficialajn jubileajn poŝtkartojn 1821—1911). — *20. S-o Sergis Surovcev, *Sčelkovo*, Sev. žel dorog. Fabriko Poljakova (kor. per belaj, kolor. p. k. Tuj resp.; marko bildflanke). — [illegible]era Merhs (vidu adr. *20.). — *21. S-o A. D. Miĥajlov, stud. VIII de la gimnazia pensiono. *Kronštadt*, Rusujo. (ĉiam resp.). — *22. S-o Česlav Pruski, Gimnazia pensiono. *Kronŝtadt* (ĉiam resp.). — *23. S-o Alfionov Victor, lernanto de Duĥovnaja Seminaria. *Samara*. Rusujo. (il. k.; p. m.). — *24. S-o K. Radionov, *Kronŝtadt*, P[illegible]aja ul. 31. kv. 12. (il. k.). — *25. S-o Miĥail Alperovič. *Kronštadt*, Mujskaja gimnazio, (il. k.; ĉiam resp.). — *26 S-o David Vi[illegible]skij. *Gomel*, Rusujo. (koresp. kun poetoj kaj amatoroj de poe-



zio; p. m. kun neeŭropanoj). — *27. S-o Voldemaro Bazileĉ, Kamenec-Pod. Russkie folvarki. (kor. per. let. pri interesaj temoj, interŝ. bohemajn jurnalojn. volas vendi sian p. m.-kolekton). — *28. S-o Georg Juhanson pr. *Quellenstein*, Liflando. Rusujo (16-jara; il. k.). — *29. S-o Voldemaro Antonovskij, *Elec*, Dvorjanskaja 97. (il. k.; p. m.). — *30. S-o Nik. Vitebskij, *Samara* Duĥovnaja seminario II. klaso. — *31. S-o M. Gorman, *Lodz*, Vidzevska str. 50. (kor. per il. k.; let.). — *32. Fraŭlino Paŭlino Ĥaber, *Samara*, Voskresenskaja 78. kv. 9. (il. k.). — *33. S-o Teodoro Lejboviĉ, *Taurogen*. Kovna gub. Rusujo. — *34. F-ino Alexeeva, *Voronej*, Voznesenskaja 7. Rusujo (il. k. koloritaj). — *35. Tridek gimn. kursanoj de s-o V. Basov, *Orel*, 2. Posadskaja str. 19. Rusujo. — *36. S-oj V. Nazarov, IV. klaso; N. Vasilev III. kl. de Duĥovnaja seminaria en *Samara*. — *37. S-o A. J. Lukonin, ortopedisto. *Samara*, Nikolaevskaja 107. Rusujo. — *38. S-o Alex. Kór, gimnaziano, *Tuzser*, Szabolcsom. Hungarujo (ĉiam resp.). — *39 S-o Péter Gerger, *Zsombolya*, Torontál-m. Gyártelep. Hung. (il. k.) — *40. S-o Alex. Tóth, *Kisvárda*. Baross-ut. 14. Szabolcsom. Hung. — *41. S-o J. Farkas, instruisto. *Budapest*, Mozdony-ut. 40./I. (let., p. m., il. k.). — *42. S-o Antal Khirer, *Nagy Körös*, N-o 1 k, 113 sz. Hung. (interŝ. monerojn, portretojn, gazetojn, naciajn flagojn, ilustrajojn ktp.). — *43. S-o Lad. Sochanski, unujara volontulo ĉe la 2 F. J. B., 1 komp. *Borgo-Valsugana*, Suda Tirolo (kor. precipe kun skoltoj pri „scauting“ per il. k.). — *44. S-o Yvonne Verleut, *Gent*, 15. pl. de l'Ecluse, Belgujo (il. k., p. m.). — *45. S-o E. Canet *Marcelcave* (Somme) Francujo. (18-jara; int. il. k.). — *46. S-o Volodimir Antonio, *Stryj*, str. Lublinskoji Uniji 50. Galicio. (il. k.). — *47. S-o Adam Grechowicz, profesoro de pola lingvo en i. r. reallernejo, *Krosno* Galicio (il. k., p. m.). — *48. S-o J. Unger, *Zürich*, Hauptpostfach 6104. Svisujo (int. sigelmarkojn po kelke da ekz.). — *49. S-o Maurice Guillaume, *Toul*, 13. pl. du Marché, M. & M. Francujo (kolektas esp. gazetojn, gvidlibrojn, ktp.; sendas il. k.). — *50. S-o Mod. Millán, *Oruro*, Casilla 138. Bolivio, Ameriko (kor. kun stenogr. per Aoro). — *51. S-o Stefan Božinoff, bulg. studento; *Dijon*, Bd. Sevigné 3. Francujo (int. p. m.; proponas la balkanajn). —

Eldonanto: **Ed. Kühnl.**
Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství spol. s r. o. v Praze.